

Karaj,

Certe vi aŭdis pri la nova programo de UEA kiu nomiĝas AMO – por Aktivula Trejnado. Ankaŭ pri la Seminarioj de AMO. La unua tia seminario okazos baldaŭ en nia mondparto, apud Budapeŝto inter la 22a kaj 24a de marto 2014. Antaŭ semajno ni sendis ties programon al la plimulto el vi. Informoj pri la seminario kaj la samtempa junulara aranĝo JER troveblas ĉe www.jer.hu.

Stipendioj

UEA disponigis por tiu seminario modestan sumon (€300) por anonci stipendiojn. Ties celo estas moderigi la kostojn de partopreno en tiu seminario por junaj aktivuloj el Hungario aŭ niaj apudaj landoj. Ni ofertas tri stipendiojn de po €100 – ni modifos la sumon/nombrojn se venos ĉefe petoj el Hungario. Vi vidus, ke la plenaj (senrabataj) surlokaj kostoj por programo, tranoktado kaj manĝoj sumas je ĉ. €70. Unue, ni uzos la stipendian sumon kovri la surlokajn kostojn, due ni donos surloke la restantan sumon, ĉu en eŭroj, ĉu en forintoj.

Anoncado kaj limdatoj

Ni pardonpetas pro la malfrua anoncado de la stipendioj; UEA urĝe bezonas pliajn laborfortojn por tiaj evoluigaj laboroj. Ni akceptos petojn per simpla retmesaĝo kun temlinio nepre komenciĝonta per **AMO-1 stipendio**, prefere kun via nomo kaj landkodo poste. La limdato por sendi petojn estos vendredo, la 28a de februaro; ni anoncos la rezultojn ĝis la 5a de marto 2014. Sendu viajn kandidatigojn al stefan.macgill@gmail.com, kopie al jer@jer.hu. Provu limigi viajn petomesaĝojn al ĉ. 400 vortoj.

Kondiĉoj kaj preferoj

- Ni favoros kandidatojn inter 18 kaj 30-jaraj, sed konsideros pli aĝajn. Ni ne akceptos kandidatojn de tiuj sub 18-jaraj, pro juraj kialoj.
- Ni favoros kandidatojn, kiuj havas limigitajn financajn rimedojn kaj malofte povis vojaĝi al eksterlandaj renkontiĝoj.
- Ni atendas adekvatan konon de Esperanto por sekvi la seminariajn sesiojn (ĉiuj en Esperanto).
- Ni favoros kandidatojn, kiuj povas liveri apogon de Landa Asocio de UEA, Landa Sekcio de ILEI aŭ TEJO, aŭ loka grupo, aŭ konata aktivulo.
- Kondiĉo de kandidatigo estos sindevigo ĉeesti la tutan seminarian programon, de la vendreda vespero ĝis la lunda vespero.

Enhavo de kandidatigaj mesaĝoj (ĉ. 400 vortoj entute)

- Bazaj informoj pri vi -- nomo, adreso, aĝo, kontaktoj... (Ne necesas, se vi jam aliĝis al JER).
- Via fono: studoj, interesiĝoj, laboro, ek-esperantistiĝo kaj lingva nivelo.
- Resumo pri via ĝisnuna agado en la E-movado.
- Resumo pri via dezirata rolo en tiu movado estonte.
- Resumo pri via ebla kontribuo al seminariaj sesioj, kaj kion vi atendus de la aranĝo.
- Listigo de alkroĉitaj rekomendoj de via Landa Asocio aŭ alia instanco aŭ unuopulo.

Pripensu serioze la eblojn, kaj proponu kandidatojn. Bv. diskuti la eblojn ene de viaj asocioj, sekcioj, kluboj. Bv. konigi la eblojn inter viaj membroj. Antaŭdankon!